

2023.1.2 Ĉeĥio チェコ

Saluton sinjoro Jasuo,

Al Sumy estis 114 art'atakoj por unu tago. En Harkiv 1260 domoj sen hejtado. Al Dnipro 20 raketoj kaj 12 dronoj Shahed-131, kiuj oni likvidis. Al tuta Uktaino 45 dronoj dum unu tago. Al Hersona regiono pli ol 40 art'pafoj dum unu tago.

Ek de komenco de milito veturiloj el Dnipro transportis 40000 homojn al pli sekuraj regionoj. Post lasta pafado en Kyjiv pli ol 1000 homoj estas vunditaj.

El Odesaj havenoj foriris ankoraŭ ses ŝipoj. En ĉirkaŭaĵo oni rimarkis multajn rabobirdojn.

Al Mykolajiv oni sendis (el Nederlando) 20 tunojn da mandarinoj por infanoj. 140 milionoj de eŭroj. Kaj 20 sistemojn Starlink por subteno de telefonsignalo. Ankaŭ bulboj de krokusoj, tulipoj, narcisoj, hiacintoj, por pribeligi urbon. Hieraŭ en Mykolajiv estis likviditaj 7 dronoj, kaj kelkaj raketoj falis al loĝdomoj.

Ankaŭ estis informoj, ke en garnizonejo de terorisma organizacio Vágner (en okupita Makijivka) estis likviditaj pli ol 400 okupantoj kaj ankoraŭ 200 vunditaj. Apud Bahmut mortis pli ol 117 okupantoj nur dum monato. Hieraŭ la ĉeĥa ĉefministro diris, «Konstruado de komuna forta defendo estas unu nura vojo al paco. Kaj sendependeco en energia sfero estas grava tasko ne nur por Ĉeĥio, sed ankaŭ pot tuta Eŭropo. Energion necesas ĉerpi el kelkaj kontrolitaj fontoj. Hodiaŭ ukraina prezidento dankis al Ĉeĥio kaj al ĉiuj landoj subtenantoj kaj apartaj personoj, kiuj helpas al Ukrainoj defendi liberecon kaj valoraĵojn de demokratio. Olga

Dne po 2. 1. 2023 4:01 uživatel <[horizonto@r.water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@r.water.sannet.ne.jp)> napsal:

ヤスオさん、こんにちは。

Sumy ĉe 1 日で 114 回の攻撃を行いました。ハリコフでは、暖房のない家屋が 1260 戸あります。ドニプロへは 20 のロケットと 12 のドローン Shahed-131 が撃ち込まれましたが、皆迎撃しました。1 日でウクライナじゅうに 45 のドローンが撃ち込まれました。ヘルソン地方へ 1 日で 40 を超えるミサイルが撃たれました。

戦争が始まって以来、ドニプロから車両で 40,000 人をより安全な地域に輸送してきました。キエフでのこの前の砲撃の後、1000 人以上が負傷しました。

別の 6 隻の船がオデッサの港を離れました。この地域では多くの猛禽類が見られました。

Mykolajiv に、オランダから子供たちのために 20 トンのみかん、1 億 4000 万ユーロ、また、電話信号をサポートするための 20 の Starlink システム、都市を美化するクロッカス、チューリップ、水仙、ヒヤシンスの球根も送られました。昨日、ミコラジブで 7 機の無人偵察機が迎撃され、いくつかのロケット弾が住宅に落ちました。

テロ組織 Vágner の駐屯地 (占領されたマキジフカ) で 400 人以上の占領者が殺され、200 人が負傷したという情報もありました。Bahmut の隣では、117 人以上の占領者がわずか 1 か月で死亡しました。

昨日、チェコの首相は、「共通の防衛力を構築することが平和への唯一の道である」と述べた。そして、エネルギー分野における独立は、チェコ共和国だけでなくヨーロッパ全体にとっても重要な課題で

す。 エネルギーは、多数の制御された資源から引き出す必要があります。今日、ウクライナ大統領は、チェコ共和国と、ウクライナが自由と民主主義の資産を守るのを支援しているすべての支援国と個人に感謝しました。 オルガ

2023.1. 3 Japanio 日本

### **ウクライナ避難者の 65% “しばらく日本に滞在したい”**

ウクライナから日本に渡航してきた避難民の数は 12 月 9 日時点で 2000 人を超えた。半数近くの人には「ほとんど話ができず、日本語が聞き取れない」ため、フルタイムの仕事をしている人は少なく、孤独を感じたり眠れないなど精神的に落ち着かない状態にある。

日本財団のウクライナ避難民へのアンケート調査で、約 4 分の 1 の人が「できるだけ長く日本に滞在したい」と定住の意向を持っていた。「ウクライナの状況が落ち着くまでは、しばらく日本に滞在したい」と合わせると 65%超が長期滞在を希望している。

調査は 11 月下旬から 12 月上旬にかけて、日本財団が支援する 18 歳以上の避難民を対象にウェブ経由で実施し、750 人から回答を得た。日本財団は 2179 人（12 月 9 日時点）の避難民のうち、1608 人に対して渡航費や生活費の支援を実施している。

給付金や生活物資以外に必要な支援について聞いたところ、「遊び・観光」55.9%が最も多く、「仕事の紹介、職業訓練」39.2%、「地域の支援団体、支援希望者とのマッチング」36.7%、「日本人の仲間づくり」36.0%が続いた。

最近 2 週間の状況を聞いたところ、「眠れないことがある」人は「ほとんど毎日」「比較的多い」「ときどき」を合わせて約 7 割に達した。「孤独を感じる」「物事に集中できない」は約 6 割だった。

自由記述では、支援への感謝の一方で、「日本語学校プログラムに応募し、日本に住む友人から遠く離れた場所に送られた。東京に引っ越して、イベントに参加したり、友達に会ったり、仕事を見つけない」「現在住んでいる地域ではウクライナ避難民の交流イベントがほとんどない」などの声が寄せられた。

## **2022.12 Japanio**

### **Rifuĝintoj el Ukrainio al Japanio**

#### **Pli ol 65% de la enketitoj deziras resti en Japanio dum longa tempo en Japanio**

Ĝis la 9-a de decembro, la nombro da rifuĝintoj, kiuj venis al Japanio el Ukrainio, superis 2 000. Preskaŭ duono el ili "apenaŭ povas paroli aŭ kompreni la japanan", do malmultaj el ili havas plentempajn laborojn, kaj ili estas en stato de mensa malkvieto, sentante sin solecaj aŭ estante nekapablaj dormi.

Laŭ la demanda enketo de la Nippona Fonduso pri ukrainaj rifuĝintoj, ĉirkaŭ unu kvarono el ili diris, ke ili volas kiel eble plej longe resti en Japanio kaj volas ekloĝi tie konstante. Kune kun "Mi ŝatus resti en Japanio dum kelka tempo ĝis la situacio en

Ukrainio trankviliĝos", pli ol 65% de la enketitoj deziras resti en Japanio dum longa tempo.

La enketo estis farita interrete en novembro kaj decembro, celante evakuitojn pli ol 18-jarajn, kiuj estas subtenataj de la Nippona Fonduso. Oni ricevis respondojn de 750 homoj el la 2,179 evakuitoj (en la 9an de decembro). La Nippona Fonduso disponigis al 1,608 homoj asistadon por vojaĝoj kaj vivkosto.

Demandite pri necesa subteno krom avantaĝoj kaj ĉiutagaj necesaĵoj, ili repondis jene:

55,9%: distraĵoj/turismo

39,2%: laborperado kaj profesia trejnado

36,7%: renkontiĝoj kun lokaj subtengrupoj kaj subtenantoj

36,0%: fari japanajn amikojn"

Demandite pri la situacio en la lastaj du semajnoj ili repondis jene:

ĉirkaŭ 70%: havis problemojn por dormi "preskaŭ ĉiutage", "relative ofte" kaj "foje".

ĉirkaŭ 60%: sentis sin solecaj kaj ne povas koncentriĝi pri aferoj.

En la libera priskribo, esprimante dankemon pro la subteno, iu skribis: "Mi petis por japana lingvolerneja programo kaj estis sendita al loko malproksima de amikoj loĝantaj en Japanio." "Mi volas translokiĝi al Tokio por partopreni aranĝojn kaj renkonti amikojn." "Mi volas trovi laboron," kaj "okazas preskaŭ neniuj interŝanĝaj eventoj por ukrainaj rifuĝintoj en la urbo, kie mi nun loĝas."

La 4-a de januaro 2023 Rusio ロシア

## Letero el Moskvo モスクワからの手紙

*4-a de januaro 2023*

Mi gratulas vin pro la venonta nova jaro. Por nia regiono, ĉi tiu festo estis signifa, sed ne ĉi-jare. Mi pensas, ke la loĝantaro de Rusio spertas la plej fortan streĉitecon - la milito alportas nenion bonan - viroj mortos grandnombre, la ekonomio iĝos pli malriĉa pro sankcioj, kaj la grado de malpacienca kaj krueleco pliiĝos. Ne estas estonteco, kaj tio estas malbona.

2023 年 1 月 4 日

明けましておめでとうございます。私たちの地域にとって、このお祝いは重要でしたが、今年はそうではありませんでした。ロシア人は最も強い緊張を経験していると思います-戦争は何も良いことをもたらしません-男性が大量に死に、経済は制裁のために貧しくなり、非寛容と残酷さの程度が増します。未来はありません、そしてそれは悪いことです。

Tre impresis min video el Dolgoprudny (urbeto ne malproksime de Moskvo): maljunulino en la buso diris al sia najbaro, ke la milito estas tiel malbona, ke rusaj soldatoj eĉ ne havis ŝuojn. Alta dikulo silente alproksimiĝis al tiu ĉi virino kaj silente tiris ŝin de la seĝo, trenis ŝin reen laŭ la planko de la buso kaj ĵetis ŝin al la plej proksima bushaltejo rekte en la neĝon.

Mi legis ankaŭ raportojn pri homo en Belgorod, kiu pendigis kontraŭmilitajn sloganojn en la urbo – pluraj fiuloj el la lokanoj forte batis lin, kaj poste transdonis lin al la polico.

Estus bone eventuale trovi ĉiujn ĉi tiujn homojn kaj atingi justecon kaj pardonpetojn de la fiuloj, sed nuntempe timo pli kaj pli plenigas la landon.

私はドルゴプリドニ（モスクワからそう遠くない小さな町）のビデオがとても印象的でした。バスに乗っていた老婦人が隣人に、戦争がひどすぎてロシアの兵士は靴さえも持っていないと言いました。背の高い太った男が静かにこの女性に近づき、静かに彼女を椅子から引き離し、バスの床に沿って引きずり戻し、最寄りのバス停にまっすぐ雪の中に投げ込みました。私はベルゴロドで反戦のスローガンを掲げた男性についての報告も読みました。地元住民の何人かの悪党が彼を激しく殴り、警察に引き渡しました。最終的にこれらすべての人々を見つけて、悪党から正義と謝罪を得ることができればいいのですが、現時点では恐怖がますます国を埋め尽くしています。

Ĉu la kaptitoj ricevas leterojn, vi demandas? - Jes, mi eĉ vidis la respondojn de kelkaj el ili. Unu advokato eĉ diris, ke la prizona administrado traktas politikajn malliberulojn kun respekto, sed mi ne certas, ke ĉie estas la sola maniero.

囚人は手紙を受け取りますか？ -はい、私は彼らからの返事を見たことがあります。ある弁護士は、刑務所管理者は政治囚を敬意を持って扱っているとさえ言っていましたが、それがどこでも唯一の方法であるかどうかはわかりません。

Pli pri krueleco: Mi daŭre pensas pri la kolektiva portreto de subtenanto de la milito en Rusio, kaj ŝajnas al mi, ke ili ĉiuj havas unu komunan aferon - kruelecon. Almenaŭ tiuj, kiujn mi konas proksime kaj delonge, kaj tiuj, kiuj fervore defendas la militon, estas homoj sen empatio.

残虐行為について: 私は、ロシアでの戦争支持者の一般的な傾向について考え続けていますが、彼らには共通点が1つあります。それは残虐行為です。少なくとも私が古くから親しみ、熱心に戦争を擁護している人々は、共感のない人々です。

La instruistino O., pri kiu mi jam skribis kaj kiu ne kredas je la murdoj de pacaj ukrainoj fare de la rusa militistaro.- Ŝi observis sian malsanan patrinon dum multaj jaroj, ŝi ne tre ŝatis ŝin. Ŝi ne havas amikojn, ŝi tenas kontakton kun malmultaj homoj. Ŝi estas fraŭla kaj tio konvenas al ŝi.

私がすでに書いた、ロシア軍による平和なウクライナ人の殺害を信じていない教師 O ですが、彼女は病気の母親を何年も見ていましたが、彼女をあまり好きではなかったのです。彼女には友達がなく、連絡を取り合う人はほとんどいません。彼女は独身で、それが彼女に合っています。

La duan programiston mi bone konas, ni interparolis multajn jarojn antaŭ la milito, antaŭhieraŭ mi telefonis lin, kaj li konfirmis, ke li tre subtenas kaj Putin kaj la militistaron, ke laŭ lia opinio ĉio iras en la ĝustan direkton. Ĉi tiu ulo ankaŭ ne amas sian patrinon, li loĝas kun ŝi - ĉar ĝi estas tiel oportuna. La patro forlasis sian familion kiam li estis ankoraŭ malgranda, sed eĉ poste, kun maloftaj renkontiĝoj, li neniel zorgis pri la infanoj, ne montris zorgon kaj amon. Ĉi tiu programisto diris, ke mi estas la lasta kun kiu li ne perdis la ŝancon paroli almenaŭ unufoje jare.

二人目は、プログラマーで、戦争の何年も前に話したことがありました。一昨日彼に電話しました。彼は、プーチンと軍の両方を強く支持していて彼の意見では、すべてが正しい方向に進んでいる、ということです。この男も母親を愛していません。彼は彼女と一緒に住んでいます、というのはそれがとても便利だからです。父親は彼がまだ小さいときに家族を離れましたが、その後もめったに会うことはなく、子供たちのことをまったく気にせず、世話や愛情を示しませんでした。このプログラマーは、少なくとも年に一度話をする機会を逃さなかったのは私が最後だと言いました。

Ankaŭ homoj nekonataj al mi, kiujn mi hazarde intervjuis por mia nova laboro, estis ankaŭ dividitaj en du grupojn - tiuj, kiuj post la intervjuo invitis min por teumi en la domo, kaj tiuj, kiuj hastis rapide foriri kaj fermi la pordon. Vi verŝajne divenis – homoj, kiuj estis malkontentaj pri la registaro, invitis min al la domo, kaj porregistaraj subtenantoj evitis proksiman kontakton. Ĉi tio estas malgraŭ tio, ke mi faris mian plejblon por ne montri mian opinion pri politiko.

Se la homaro jam inventis kvantan mezurilon de empatio, bonvolu sendi ĝin ĉi tien kiel eble plej baldaŭ, ni faros grandan malkovron pri subtenantoj kaj kontraŭuloj de la imperia milito))

また、たまたま転職の面接をした私の知らない人たちも、2つのグループに分けられました。面接後に家に遊びにおいでと誘ってくれた人と、急いで出て行ってドアを閉めた人とにです。ご想像のとおり、政府に不満を持っている人々は私を家に招待し、政府支持者は密接な接触を避けました。これは、私が政治について自分の意見を表明しないように最善を尽くしたという事実にもかかわらずです。

人類がすでに共感の定量尺度計を発明しているなら、できるだけ早くここに送信してください。帝国戦争の支持者と反対者について大きな発見が出来るでしょう。

Dankon, Goro, pro maltrankvilo pri mia bonfarto. Ĉio funkciis bonege por mi. Pere de konatoj mi ricevis alian laborproponon, sed ĝenerale trovi laboron en Moskvo de laborema homo estas problemo. Mi ne kalkulas je la ŝtato - senlaboreco-subvencioj estas etaj, malpli ol \$ 50 monate, kaj tiam vi ankoraŭ devas multe klopodi por akiri ĝin.

La poŝmono povas esti eĉ pli se vi perdas vian oficialan laboron. Sed estas por mi pli facile fidi je mi mem kaj je la helpo de amikoj, kaj ne je oficistoj, kaj mi sukcesas sufiĉe bone.

五郎さん、私の健康を心配してくれてありがとう。すべてがうまくいきました。知人を通じて別の仕事のオファーがありましたが、一般的に勤勉な人がモスクワで仕事を見つけるのは難しいです。私は国を当てにしていません - 失業給付は月額 50 ドル未満の小さなものです。それもそれを得るには大変な努力が必要なのです。

公職を失った場合、手当はさらに増える可能性があります。しかし、役人ではなく、自分自身と友人の助けに頼るほうが簡単で、うまくいきます。

**Nun mi tre zorgas pri la alta probableco de granda ondo de mobilizado - de 200 mil ĝis 2 milionoj, laŭ diversaj novaĵfontoj, Rusio planas sendi al la fronto. Kaj rusoj kaj ukrainoj mortos. La malamo inter popoloj pli kaj pli pliiĝos, sed tiuj estis la plej proksimaj landoj.**

今、私は動員の大きな波の可能性が高いことを非常に心配しています-さまざまなニュースソースによると、20万人から200万人まで、ロシアは最前線に派遣する予定です。そしてロシア人とウクライナ人の両方が死ぬでしょう。人々の間の憎しみはますます高まるでしょうが、それらの民族は私の一番近い国の人々なのです。

**Kiel finiĝos la milito? Se Ukrainio malsukcesos, tiam mi pensas, ke milionoj da ukrainoj estos submetitaj al subpremo, torturo, multaj estos mortigitaj aŭ kripligitaj. En Rusio mem, kanajloj de ĉiuj strioj leviĝos, kaj ĉi tio ankaŭ estos katastrofa procezo. Se Ukrainio pluvivos, la vundoj de ukrainoj doloros longe, sed ili resaniĝos. Kaj kio okazos en Rusujo?**

戦争はどのように終わるのでしょうか？ ウクライナが負ければ、何百万人ものウクライナ人が抑圧や拷問にさらされ、多くの人々が殺されるか、不具になると思います。ロシア自体では、すべての分野で悪党が台頭し、これも壊滅的なプロセスになるでしょう。ウクライナが生き残れば、ウクライナ人の傷は長く続くでしょうが、やがては癒えるだろう。そして、その場合ロシアでは何が起こるのでしょうか？

**En Rusujo estos multaj iamaj soldatoj kun kripla psiko, koleraj, ebriaj. Same kiel nun, honestaj homoj ne rajtos alveni al la potenco - ĉiuj ĉi membroj de Unuigita Rusio, ĉiuj oficistoj - ŝanĝos sian starpunkton surface, sed restos en la samaj oficejoj. Kion fari kun homoj kiel la lernejestro, kiu skribis denuncon de studento ĉar ŝi havis ukrainan flagon sur sia profilbildo?**

ロシアには、精神が不自由で、怒って、酔っ払っている元兵士がたくさん出るでしょう。今と同じように、正直な人々が権力を握ることは許されないでしょう - 統一ロシアのこれらすべてのメンバー、すべての役人は、表面的には立場を変えますが、同じオフィスにとどまります。生徒のプロフィール写真にウクライナの国旗があったという理由で生徒の非難レポートを書いた校長のような人をどうするか？

**Estu kiel ajn, fortranĉi rusan energion ŝajnas al mi bona afero, ĉar ĝi malgrandigas la mortigajn kapablojn de la registaro. Mi pensas, ke eŭropaj oficistoj kulpas pro tio, ke ili nutras la rusan diktatorecon per sia mono dum pli ol 20 jaroj. Sed estas tempo, ke ĉiu rigardu sin, sian vivon strikte kaj objektive, kaj ĉi tio estas la sola pluso, kiun alportis al ni la pasinta jaro.**

いずれにせよ、ロシアのエネルギーを遮断することは、政府の殺害能力を低下させるので、私には良い

このように思えます。ロシアの独裁政権に 20 年以上にわたって資金を供給したことは、ヨーロッパの当局者の責任だと思えます。しかし、誰もが自分自身、自分の生活を厳密かつ客観的に見る時が来ており、これが昨年が私たちにもたらした唯一のプラスです。

**Amike** かしこ